

64-a jaro n-ro 180 2023:2

la lampiro



**Kion
signifas
stoikismo
en la 21-a jarcento?**

Kulturkunveno

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Prelego de

Alex Cesário

Vivo kaj verko de Modigliani



29^a - aprilo, 2023

16^a hora

en la sidejo de EASP

R.Faustolo, 124 - Água Branca, São Paulo

Estu bonvena!

Enhavo

- 4 | **Vortoj de la redaktanto**
Aparte atentiga
- 5 | **Vortoj de la prezidanto**
Kunlaborantoj serĉataj
- 6 | **Iom da Filozofio**
Kion signifas stoikismo en la 21-a jarcento?
- 8 | **Kino kaj aliaj artoj**
Yayoi Kusama
- 9 | **Por via medito**
Ne faru arton!
- 12 | **Iom da Literaturo**
Du kronikaĵoj
- 14 | **Por iom rememori**
Atentu plena por pli bona vivkvalito
- 17 | **Movado**
Revigliĝas la renkontoj en la Paraíba-valo
- 19 | **El miaj vojaĝoj**
Vizito al la urbo Herzberg
- 22 | **Iom da poezio**
Eltrovo
- 23 | **Forpaso**
Adiaŭo de Lilia Ledon
- 24 | **El mia vidpunkto**
Vojoj kaj devojiĝoj de la homaro
- 25 | **Recenzo**
La templanoj, iliaj misteroj, iliaj sekretoj
- 27 | **Rakonto**
Homo sapiens, sapiens
- 30 | **El mia ĉiutaga vivo**
Haltu, ni ŝanĝu la sidlokon.
- 32 | **Iom da Gramatiko**
Lingvaj Respondoj de Francisco S. Welchsler

la lampiro

64-a jaro n-ro 180 2023:2

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sergio Viana
(psviana@terra.com.br)

Enpaĝigo: José Roberto Tenório

*La redaktanto ne respondecas
pri la subskribitaj artikoloj*



Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de marto 1937

Propra sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
easp.org.br | contato@easp.org.br

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo A. Alencar de Lima
Vicprezidantino: Cristina de Claudia Graaf
Sekretariino: Maria Conceição Rodrigues
Kasisto: José R. Tenorio da Silvas

Konsilantaro

Paulo Sergio Viana
José Mauro Progiante

Anstataŭanto

Audino Castelo Branco

Jarkotizo por 2023

Simple Membro	R\$ 200,00
Subtena Membro	R\$ 400,00
Ŝtatinterna Membro	R\$ 100,00

Aparte atentiga

Karaj gelegantoj, en ĉi tiu numero de nia revuo vi trovas kolekton da legindaĵoj, sed pri unu aparte mi volas atentigi vin. Temas pri artikolo pri Stoikismo, verkita de nia fidela kunlaboranto Mauro Progiante, el la urbo Bauru/SP.

Kial pri tiu aparte? Ĉar ĝi estas teksto, kiu respondas al brila prelego farita de li en la sidejo de Esperanto-Asocio de San-Paulo, en la lasta sabato de marto. Tio signifas, ke nia sidejo denove ekfunkcias por ĉeestaj kunidoj. Post la katastrofa pandemio de

la nova kronviruso, ni jam denove povas brakumi, kunkafumi kaj ĉeesti bonajn kulturkunsidojn. Mi esperas, ke vi ĉiuj, laŭ via eblo, kaptos la okazon viziti la sidejon, ĝui la tieajn programerojn kaj kontribui per viaj demandoj kaj propraj prelegoj. La estraro de EASP estas malferma ankaŭ al novaj programeroj, por vivigi nian movadon. Bonvenon al strato Fáustolo!

Bonan legadon, kaj koran dankon ankaŭ al ĉiuj aliaj kontribuintoj al ĉi tiu numero de La Lampiro!

Paulo Sergio Viana



(Re)aniĝu por 2023!

Kunlaborantoj serĉataj

Saluton, karaj!

Kun granda plezuro mi diras, ke nia asocio remalfermiĝis! Granda evento markis tion, pro iniciato de Cristina Graaf kaj Wilian Gomes. Ili organizis kultur-ekskurson en la urbo San-Paŭlo, kaj sekvos aliaj similaj promenoj. Vi ĉiuj estas invitataj!



Ni pretigas kalendaron por allogi la samideanojn. Precipe ni bezonas kunlaborantojn kaj junulajn fortojn. Ni atendas viajn ideojn, vian ĉeeston, vian entuziasmon.

Ni deziras al vi sanon, feliĉon kaj fervoron por nia Esperanta afero.

Profitu la legadon de nia revuo kaj sendu al ni viajn kritikojn kaj proponojn.

Koran dankon!

Esmeraldo Aparecido de Alencar

<https://easp.org.br/asocio/#filiacao>



Kion signifas stoikismo en la 21-a jarcento?

Stoikismo estas filozofia skolo fondita en Grekio de Zenono el Kitiono (ĉ. 333 – 264 a.K.) kaj poste popularigita danke la verkojn de Epikteto, Seneko kaj de la imperiestro Marko Aŭrelio.

Laŭ la stoikistoj, memregado kaj racieco estas esencaj por interna paco kaj virta vivo. Ĉiu homo devas trovi sian rolon en la mondo kaj provi plenumi ĝin kiel eble plej bone, ne suferante pro ne realigeblaj deziroj.

La adeptoj de tiu filozofio distingis pro la rezignacio kaj kuraĝo antaŭ suferoj, ne timante eĉ la morton.

Malgraŭ la antikveco de tiu pensmaniero kaj vivstilo, en la nuna jarcento stoikismo vekas fortan atenton. Multaj libroj kaj gvidiloj estas verkitaj, inspiritaj de ĝiaj principoj, ĉar soleco, malsanoj kaj aliaj sortobatoj persistas kaj defias ankaŭ la modernan homon. Ĝi montriĝas utila ankaŭ por helpi la personojn regi sian propran vivon.

Oni ne reliefigas nun kelkajn punktojn de la antikva stoikismo, kiel determinismo kaj dia regado. La ĉefaj kialoj de la intereso pri tiu filozofio, laŭ ĝiaj nuntempaj disvastigantoj, estas la rekomendoj pri regado de la propra vivo kaj pri elektoj en ĝiaj diversaj situacioj.

Ni vivas en mondo, kie oni ofte kulpigas aliajn pro siaj problemoj kaj atendas eksterajn faktorojn por solvi ilin; kie granda kaj valorega parto de la tempo estas uzata por rigardi la najbarojn, aliulojn. La rezulto de tiu sinteno estas amaso da homoj deprimitaj, timemaj, katenitaj de nesatigeblaj deziroj, enviemaj, nekapablaj regi siajn pasiojn kaj emociojn.

Stoike vivi en la nuntempo signifas esti mastro de siaj korpo kaj psiko, esti kapabla difini kiuj estas siaj realaj necesoj, por ne malŝpari la multajn horojn de la mallonga vojaĝo, kia estas la surtera ekzistado.

Kerna principo de stoikismo, sentempa kaj do aplikinda ankaŭ nun, estas, ke la psika bonfarto havas intiman rilaton kun la aferoj, kiuj okupas la menson de la persono. Kaj kiu decidas pri tiu okupiĝo, pri la temoj, novaĵoj, movadoj, kompanioj, aktivcoj, havindaĵoj, ktp, tio estas, pri ĉio, kio inundas la menson? Kiu difinas la valoron de ĉio ajn, kio povas esti objekto de nia atento kaj do de nia tempo?

Necesas, ke ni zorge pensu pri kio fakte gravas, ne pigre aŭ kapklina akceptante la eksterajn taksadojn. Estas tasko ne transdonebla trovi la aferojn vere valorajn en la vivo.

La emfazo de stoikismo pri elekto kaj vivado de siaj valoroj kaj virtoj normale implicas atenton al simplaj agoj, ekzemple pasigi pli da tempo kun la familio, kultivi ĝardenon, turni la okulojn al la ĉielo por vidi la stelojn... Tio gravas en mondo, kie multaj mortas post vivo plena da ekscitiĝo sed sen signifo kaj klara celo.


Aldone, stoikismo povas ankoraŭ nuntempe helpi individuojn trakti malfacilajn situaciojn kaj malsukcesojn. Disvolvante fortikan pensmanieron kaj akceptante, ke certaj eventoj estas ekster ilia regopovo, homoj povas koncentriĝi en tio, kion ili povas ŝanĝi

kaj tiel pli efike uzi siajn fortojn por feliĉiĝo kaj sereniĝo.


José Mauro Progiante



Seneko la Juna
(ĉ 4 a.K. – 65 p.K.)



Imperiestro
Marko Aŭrelia
(121 – 180)



La greka filozofo Epikteto (ĉ 55 a.K. - ĉ 135 p.K.)

Yayoi Kusama



Yayoi Kusama

Ĉi foje mi decidis konigi al vi pri tre interesa japana pentristo – Yayoi kusama. Ŝi multe famiĝis antaŭ iom da tempo en arta medio, pro siaj nekutimaj kreaĵoj. Mi pensas ke, kiel mi, vi ĝuos koni iom pli pri ŝi kaj ŝia arto.

Yayoi naskiĝis en la japana provinco Matsumoto en 1929. Ekde kiam ŝi estis infano, ŝi sciis kion ŝi volis fari. Tamen,

ŝia konservema familio ne facile akceptis ŝian talenton en la mondo de arto.

En 1957, Usono ricevis Kusama ĝis ŝia reveno al japanio en 1973. Laŭ la invito kaj gvidado de usona pentristo Georgia O'keffe, Kusama partoprenis multajn ekspoziciojn – inklude PopArt seriojn, kreemajn montraĵojn kun ludoj de speguloj kaj lumoj kaj kelkajn polemikajn eventojn. Dum tiu periodo, ŝi apartenis al la movado kontraŭ milito.

Je sia reveno al japanio, ŝi daŭre kreis multon por ekspozicio, kiel laste kelkajn subĉielajn skulptaĵojn. Antaŭ ŝi komencis verki romanojn kaj poemojn.

Ekde kiam ŝi estis infano, Yayoi suferis halucinojn kaj ja ricevis diagnozon de skizofrenio. Kiel ŝi mem diras: “Mia arto estas esprimo de mia vivo, ĉefe pri mia mensa malsano, origininta el halucinaĵoj kiujn mi povas vidi. Mi tradukas la halucinojn kaj obsedajn

(Daŭrigota sur la paĝo 31)

Ne faru arton!

Arto: ĉu problemo? ĉu instigo al movo?

Kiu neniam aŭdis tion, eble infan- aĝe, tiu ĵetu la unuan ŝtonon: *Ne faru arton!*, *kvietiĝu*, *knabo!*, *silentu*, *knabino!* Portugale, “fari arton” signifas en tiu kunteksto malobei, petoli, transiri. Ĉu laŭnature, denaske, en sia DNA, Arto ne signifas ĝuste malobeon, petolaĵon, transiron? Certe jes. Ĉu arto favore al tutpova patriarkeco? Certe jes. Sen originala talento, tamen, ne estas Arto. Eble oni trovu spiriton en Arto kaj Scienco, la nekatenebla homa spirito. Se eskzistu aŭ ne limo kontraŭ Arto diru la organizata societo mem, ne ajna ŝtata estraro, provizora reprezentanto de ajna politika partio. Tio jam garantias, ke tiu ĉi artikolo volas esti minimume pensiga, instiga, polemika. Cetere, ĉu Arto iam estos unuflanka, unuanima, unuvoĉa? Sincere mi dubas pro la homa kultura diverseco. Jen invito enprofundiĝi tiun temon. Ĉu vi? Ĉu vi volas danci? Ĉu vi riskas envojiĝi laŭ tiom polemika temo? Ek do!



Artaĵo: laŭ PIV (2020)

Teorie almenaŭ, arto respondas al mondovizio, ĉar ĉiu artaĵo estas epoka produkto, kultura produkto, sed certe nur malmultaj artaj verkoj estas epokfaraj. Komence ni analizu la kapvorton **artaĵo** (PIV 2020), kun zamenhofaj ekzemploj. Poste ni legu kanton de la brazila komponisto Renato Russo, nome “Monte Castelo”. Fine, ni pri-traktu eblan aplikaĵon de Arto, eĉ kaj precipe, se Arto ne estas utilaĵo.

La kapvorton sube ni supraĵe pri-konsideru, eĉ se indas plia enprofundigo:

Artajo – *1 lo farita kun arto: pereigi la korpon per la spirito [...] tio ĉio estus artajo, kiu meritis, ke vi estu ĝia elpensinto!²; ŝi ligis bukedon k sub ŝiaj manoj aperis artajo de neordinara beleco²; la desegnaĵo prezentis belan, kvankam malgrandan artaĵon²; povosciado teknika, ne vivigata de talento, ne povas krei veran artaĵon²; malgranda artaĵa objekto².*

Certe kritika legaĵo de tiuj ekzemploj de Zamenhof postulas meti ilin en difinitan historian kuntekston. Tion faru fakulo. Ajnaokaze, indas substreki, ke la ideo pri necesa talento iel aperas en la unua frazo, ĉar talento estas spirita homa eco. Li indikas la superregon de la spirito super la korpo, *tio ĉi estus artajo, kiu meritis elpensadon*. La dua frazo emfazas kaj belecon kaj permanentan laboraĵon: estas necese *ligi bukedon* se oni celas aperigi artaĵon. Trie, li avertas, *ke povosciado teknika, ne vivigata de talento, ne povas krei veran artaĵon*. Fakte, al kiom da belaj versaĵoj mankas poezio! Laste, li mencias la eblo ekzisti *malgranda artaĵa objekto* – simile al veraj parfumoj en malgrandaj boteletoj. Pravas tion mirindaj hajkoj de *Baŝo*.

Fama kanto de Renato Russo furo-ris, nome “Monte Castelo”. Pro nekonscia interteksteco kun biblia verseto kaj

fama soneto de Kamono eble. Rimarku dialogon inter tri arĥetipoj, nome Amo, Vero kaj Beleco. Scipovantoj de la portugala legu lian tekston kaj kantu kune kun la komponisto. Jen aludoj al versoj de Biblio kaj Kamono.

*Eĉ se mi parolus la homan lingvon/
Kaj parolus la anĝelan lingvon/
Sen amo mi nenio estus.// Nur amo, nur amo/
Konas tion, kiu estas vero/
Amo estas bono, ne volas malbonon/
Ne envias aŭ enfieriĝas.// Amo estas fajro
kiu nevideble ardas,/
Estas vundo kiu doloras kaj oni ne sentas/
Estas kontento malkontenta/
Estas doloro kiu malsaĝigas sen dolori.*

Arto kaj terapio – Artoterapio

Kiel registrite, Karl-Gustav Jung vizitis la psikiatrian laboron de D-ro Nize da Silveira en **Domo de Palmoj**, en la kvartalo Engenho de Dentro [Enĵenjo de Dentro] en Rio de Janeiro. El tiu sperto ŝi verkis sian faman libron *Imagoj de Nekonscio*, kun pluraj desegnaĵoj de tieaj skizofreniuloj. Multaj psikoterapiistoj uzas nuntempe similajn teknikaĵojn. Memkompreneble oni ne nomu ilin simplajn teknikaĵojn. Tio reduktas ilin al nevera dimensio. Ne nur faka studo necesas pri tiu nobla laboro, sed ankaŭ vera amo al psiĥaj suferantoj. Psiĥa malsano povas atingi

ĉiun ajn dum certa vivofazo. Pli ol tekniko, ama sindonemo necesas por atenci animajn dolorojn, kiaj estas anksieco, angoro, senbrida ĵaluzo, envio, spleno aŭ depresio.

Jung kutime asertis, ke manoj scias esprimi pli bone ol vortoj pri malfacilaj spertoj, pri nediraĵoj en onia vivo. Jen ĝuste ĉi tie rolas Arto kiel terapia rimedo. Indas zorgemi por intuicie percepti kiu rimedo pli taŭgas en ĉiu cirkonstanco, ĉu desegnaĵo, pentrado, ĉu per akvarelo, koloraj kraĵonoj, ĉu per uzo de knedo-plasto. Se eble, simpla demando al kliento diros pri preferoj. Ekzemple, post la rakonto de malfacila sonĝo, kliento longe silentis kaj simple neis komenti ion ajn. Estis invito modeligi la scenojn per knedo-plasto, pli specife argilo. Ĉirkaŭ dek minutoj post intensa koncentriĝo kaj preskaŭ febra laboraĵo, fine, antaŭ la okuloj de la profesiulo kaj de la kliento estis reprezento de tiu sufero, tamen ĝi ne estis la sufero mem, kiu estis peza. Antaŭ ili aperis simboloj pri kiuj eblis babili eĉ kun ridetoj. La mensa fantomo forfuĝis, kiam la kliento konstatis, ke tia enhavo ne estis propraĵo de individuo. Male, per vizito al verkaĵo *Enkatenigita Prometeo* de la pentristo Ruben, tiu universala greka mito pri memvundado per la beko de vulturo estas temo de ĉiuj tempoj. Kiam eblas

metafora legado de simbolo, la homa Psiĥo foje sukcesas prilabori kaj resignifigi tiun enhavon. Kun Jung oni nuntempe scias, ke laŭlitera percepto pri realo estas malsano. Male, simbolo estas ĝi mem vojo al metafora interpreto, pli riĉa, pli sana, pli proksima al la Tutaĵo, *Self* aŭ *Imago Dei*, laŭ esprimo de Jung. *Self* estas psiĥa instanco onin konsistanta.

La fama pentraĵo de Pablo Pikaso, *Gverniko* [portugale *Güernica*], temas pri la katastrofo de la Hispana Civila Milito. Laŭ anekdotiko rakontita de Profesoro pri Literaturo, pro tiu verkaĵo Pikaso estis demandita de Generalo: “Ĉu vi faris tion?” –



Pablo Pikaso
(1881 - 1973)

– demandis li kun malŝato. La hispana Pentristo vigle rifuzis la maldecan pretekston: *Ne mi, S-ro Generalo! Vere vi faris tion!*

Paulo P Nascentes

Emerita profesoro (IL/UnB), verkisto,
poeto, artoterapiisto

Du kronikaĵoj



Rubem Braga (1913-1990) naskiĝis en la brazila ŝtato Espírito Santo. Li estis premiita poeto kaj verkisto, kiu sin dediĉis precipe al produktado de nelongaj tekstoj, kiujn en Brazilo oni nomas “kronikaĵoj”. Temas pri leĝera, senpretenda literaturo, kiu celas montri scenojn de la ĉiutaga vivo, ofte plenajn de delikata poezia spirito. Li laboris ankaŭ kiel diplomato kaj ĵurnalisto.

ETA KAFO

Mi legis la plendon de koleraj ĵurnalraportisto, kiu bezonis interparoli al poliestro, kaj ricevis la informon, ke tiu homo iris trinki etan kafon. Li longe atendis, kaj alvenis al la konkludo, ke la oficisto pasigis la tutan tagon trinkante kafon.

La junulo prave koleris. Sed kun iom da imagemo kaj bonhumoro, oni povas pensi, ke unu el la subtilaĵoj de la temperamento de homoj en Rio estas precize ĉi tiu frazo:

— Li iris trinki etan kafon.

La vivo estas malĝoja kaj komplika. Ĉiutage estas necese paroli kun tro granda kvanto da homoj. La solvo por tio estas iri trinki “etan kafon”. Por tiu,

kiu maltrankvile atendadas, tiu “eta kafo” estas io senfina kaj tortura.

Atendinte dum du-tri horoj, oni emas diri:

— Nu, sinjoro, mi foriras. Kompreneble, S-ro Bonifaco mortis, droninte en la eta kafo.

Ho jes, ni korpe kaj anime dronu en la eta kafo. Jes, ni lasu ĉie ĉi tiun simplan, malprecizan sciigon:

— Li foriris por trinki kafon kaj diris, ke li baldaŭ revenos.

Kiam la Amatino alvenos kun siaj malĝojaj okuloj kaj demandos:

— Ĉu li ĉeestas?

iu transdonos nian senadresan sciigon...

Kiam alvenos amiko, kaj kiam alvenos kreditoro, kaj kiam alvenos parenco, kaj kiam alvenos malĝojo, kaj kiam la morto alvenos, tiam la sciigo estos la sama:

— Li diris, ke li iros trinki etan kafon...

Ni povas krome lasi la ĉapelon. Ni devas aĉeti ĉapelon speciale por ĝin lasi. Tiel homoj diros:

— Li iris trinki kafon. Certe li baldaŭ revenos. Lia ĉapelo kuŝas ĉi tie...

Ho! Ni tiel forkuru, sen tragedio, sen malĝojo, tiel ni forkuru. La vivo estas tro komplika. Ni foruzas tro multe da pensoj, tro multe da sentoj, tro multe da vortoj. Plej oportune estas foresti.

Kiam alvenos la granda momento de nia destino, tiam ni estos foririntaj antaŭ kvin minutoj por trinki kafon. Ni iru, ni iru trinki etan kafon.

LA ALIA NOKTO

Unu tagon mi iris al San-Paŭlo kaj decidis reveni al Rio vespere, en vespero venta kaj pluva, same tie kiel ĉi tie. Kiam mi revenis hejmen per taksio, mi renkontis amikon kaj kunveturigis lin ĝis Kopakabano, kaj mi

diris al li, ke tie supre, super la nuboj, estas belega luno, plena luno; kaj ke la malbelaj nuboj, kovrantaj la urbon, estis videblaj de supre, lüne prilumataj, iaj ravaj matracoj, tute blankaj, ia nerealeca pejzaĝo.

Post kiam mia amiko eliris el la aŭtomobilo, tiam la ŝoforo kaptis la okazon, ke haltiga semaforo aperis, kaj demandis min:

— Pardonu min, mi aŭdis vian interparolon. Sed ĉu vere, ke troviĝas lunlumo, tie supre?

Mi konfirmis: jes, super nia nokto nigra, kaj koteca, kaj aĉa, troviĝas alia — pura, perfekta kaj belega.

— Sed, kia mirinda afero...

Li eĉ metis sian kapon ekster la aŭton por rigardi la pluve fermitan ĉielon. Poste li plu stiris, pli malrapide. Mi ne scias, ĉu li revis fariĝi aviadisto, ĉu li pensis pri io alia.

— Vere mirinde...

Kaj kiam mi elaŭtigis kaj pagis la veturadon, li diris al mi “bonan nokton” kaj “multan dankon al vi”, tiel sincere, tiel emfaze, kiel se mi estus donita al li reĝan donacon.

(Esperantigis Paulo S. Viana)

Atento plena por pli bona vivkvalito

Vi ĉiuj jam scias ke mi deĵoras en la esperanta klubo de Pasárgada, kaj ĉi tien mi venas por raporti, al karaj legantoj de tiu bonega revuo La Lampiro, pri niaj renkontiĝoj, prelegoj, kaj aliaj okazintaĵoj. Ĉi foje, mi raportos pri kunveno, kiun mi tre amis.

La universitato en nia urbo kreis, ĉi jare, postgradan kurson pri filozofio de la religioj. Krom la bonaj profesoroj, kiuj jam laboras tie, la kursgvidanto invitis prelegantojn el diversaj religioj. Tial venis reprezentantoj de hebrea, kristana, islama, budhisma religioj, inter aliaj.

Nia kara amiko Blanketo, kiu helpis la kunordigadon de tiu kurso, parolis kun la estraranoj petante permeson por inviti du prelegantojn el tiu ĉi kurso. La estraranoj serioze demandis: — Ĉu ili povas paroli esperante? Vi bone scias ke niaj rekontiĝoj estas por praktiki la lingvon. Pri kio ili prelegos? Ĉu la temo estos interesa al ĉiuj?

Blanketo, pacience respondis al ili — Jes, mi klarigos al vi, karaj. Miaj novaj amikoj estas du monaĥoj, kiuj venis el Japanio, kaj jam studis nian karan lingvon ĉe Budhana Ligo Esperantista. La temo ne estos pri ilia religio, sed pri la meditado Atento-Plena, por ke ni sciu kiel ĝi povas doni al ni pli bonan vivkvaliton. Meditado tute ne dependas de religio.

Do, la prelego estis aprobita, kaj dudek tagojn poste niaj invititoj alvenis al nia sidejo. Ili estis monaĥoj Hiroŝi kaj Ren. Tre seriozaj viroj, treege edukitaj. Blanketo iris al la hotelo kaj per sia aŭto kondukis ilin ĝis nia klubo. La kunveno estis je la tria, sed ili alvenis preskaŭ unu horon antaŭe, kaj ni restis babilante pri la graveco de esperanto kiel pontolingvo inter niaj kulturoj tre malproksimaj.

Kiam niaj klubanoj alvenis, je la ĝusta horo, nia prezidanto rapide prezentis la invititojn kaj lasis al ili klarigi

pri la temo de la prelego. Hiroŝi leviĝis kaj malrapide faris geston kun la manoj kune, kiel oni kutimas fari por preĝi, malsuprenigis la kapon, kaj kun brilaj okuloj kaj rideta mieno komentis sian parolon.

— Esperantujo estas granda, diverseca lando, kiu ĉirkaŭas la tutan planedon. Ĉi tie, mi kaj Ren sentas nin hejme. Esperanto vere permesas al ni senti ĉi tiun fratan gastamon, tiun ĉi pacan etoson en niaj koroj. Ni estis invititaj por paroli pri Plena Atento, kaj klarigi kio ĝi estas. Kiel ĝi povas helpi nian vivkvaliton? Kiel praktiki ĝin? Ĉu la scienco jam studis ĝin?

Mi do komencos per la unua demando, kio ĝi estas. Bone, en la okcidenta mondo, multaj konas la anglan nomon “mindfulness”, angla traduko de la vorto “sati” el la lingvo pali, budhisma lingvo pli malpli 2500 jarojn antaŭe. La vorto petas, ke oni devas esti atenta al ĉiu momento, lasante for la aŭtomatan vivadon, gravan problemon homa ek de tiu tempo.

Kio signifas tion? Mi klarigos per ekzemplo. Unu persono kiu vivas malatente pri la vivo kutime suferas tiajn spertojn: subite la glaso falas el lia mano kaj rompiĝas, pro malatento; kiam li konversacias, tuj forgesas la nomon de la kunparolanto, ĵus diritan

al li. Aliaj ekzemploj: kiam li manĝas, estante kun la kapo fokusita en la farota laboro, ne gustumas ion ajn, nur englutas. Je la fino de la tago, kutime li diras al si mem, la vivo iras tiel rapide, mi eĉ ne memoras kiun mi faris hodiaŭ, kion mi tagmanĝis? Jes, tiaj personoj perdis la kvaliton de sia vivo. Ĉu okazas tio kun vi, miaj karaj amikoj esperantistoj?

En tiu momento, Ren leviĝis kaj daŭrigis la paroladon. — Jes, mi resumas do, Atento Plena enfokusigas nian atenton sur la agadon de la momento, kaj ĝi petas de ni esti atenta, por valorigi la spertojn de nia vivo. Ĝi signifas esti mense malfermita por sperti la nunan momenton kun akcepto, bonkoreco. Ju pli konscie oni vivas, des pli riĉa estas nia vivo.

Hiroŝi revenis, kaj Ren sidiĝis. Sen vortoj, nur rigardante unu la alian, ili sinkronigadis la prelegon. — Alia grava punkto, mi reliefigas, ne nur atenti pri la ekstera mondo, sed ankaŭ ekkapti la internan mondon. Grave estas, ĉiumomente, percepti la etajn korpajn mesaĝojn kiel, ekzemple, ĉu streĉita muskolo? Aŭ kiel rapida estas la spirado? Jes, amikoj, nia korpo parolas, ni devas aŭdi ĝin. Ankaŭ aŭskultu kion vi sentas kore, kiaj pensoj ludas en via menso ĉiumomente. Pensi, senti kaj

agi, interligitaj. Ni ne estas maŝino, ĉu ne?

Hiroŝi silentis kaj rigardis al ĉiuj, donante tempon por ke la ĉeestantoj pripensu liajn vortojn. Li sidiĝis, kaj Ren leviĝis, kun mieno trankvila li daŭrigis la paroladon.

— Kaj nun alia tre grava punkto. Kiam ni malkovras nin konscie, per la atento plena, oni tute ne devas fari juĝojn, tio estas bona, tio malbonas. Ni bezonas konservi sintenon de bonkoreco, kompato, milda amo al ni. Tiel mi estas, mi plibonigos, pensu tiamaniere.

— Kial tiu praktikado donas al ni pli bonan vivkvaliton, certe vi volas scii? - parolis Ren, ridetante. — Bone, unue la scienco jam konstatis signifan reduktion de tiaj turmentaj maltrankvilecoj, kiuj estas grava problemo de nia epoko, ĉu ne? Aliaj studoj pri nia cerbo montris signifan plibonigadon de vid-spaca prilaborado, kaj ankaŭ ĝia pli bona labor-memorero kaj ĝenerala funkciado.

Vere, la homoj, kiuj praktikas ĝin malpliigas senpaciencon, trovas plibonigon en siaj rilatoj kaj eĉ plifortigas la imunsistemon. Fine, oni povas diri ke ĝi plibonigas nian atenton rilate al stabileco, kontrolo kaj efikeco.

— En tiu momento, S-ro Paŭlo, petis permeson, kaj diris: - Kiel praktiki ĝin? Instruu nin.

— Jes, ni instruos la unuajn paŝojn. Unue, manĝu atente. Dum vi manĝas, ĉiutage, estu silenta kaj trankvila, gustumu ĉiun peceton da manĝaĵo en via telero. Aliaj sugestoj, kutimiĝu rigardi la ĉielon, kiam ajn vi povas, vidante ĝin tia, kia ĝi estas, la senfina bluo kaj ĝiaj blankaj nuboj, silente; kaj kiam ajn eblas, spiru movante vian abdomenon.

Ankaŭ mi sugestas simplajn bonajn ekzercojn, — diris Hiroŝi. Ĉiutage faru ion per via nereganta mano. Ekzemple, kiam vi tagmanĝas, provu teni la manĝilarojn per la alia mano; aŭ kiam vi brosas la dentojn, aŭ eĉ dum la kombado de la haroj. Lernu esti atenta.

Unu horo foriris rapide. Niaj invititoj finis la paroladon, kiun mi resumis ĉi tie, kaj la prezidanto de la klubo dankis al ili, kaj invitis ĉiujn por la kafo. Ni ĉiuj stariĝis kaj aplaŭdis ilin kun granda ĝojo, ĉar ili vekis nin por valorigi ĉiun momenton de niaj vivoj kaj esti pli feliĉaj homoj.

David Bianchini

davidesperantista@gmail.com

Revigliĝas la renkontoj en la Paraíba-Valo

La Paraíba-Valo estas interesa regiono en Brazilo. Ĝi okupas pli ol 16 mil kvadratajn kilometrojn, enhavas dekojn da urboj kaj estas ekonomie, historie kaj kulture grava. Ĝi situas inter la urbegoj San-Paŭlo kaj Rio-de-Ĵanejro, kaj estas grava ankaŭ por la landa Esperanto-movado: en pluraj tiuj urboj troviĝas grupetoj de Esperantistoj, aŭ almenaŭ izolitaj Esperantistoj.

Pro tio, de kelkaj jardekoj, oni okazigas en tiu regiono Renkontojn de

Esperantistoj, por kunigi tiujn homojn kaj praktiki la lingvon, alterne en ambaŭ ŝtatoj. Tio fariĝis bela tradicio, kiu dum la pandemio de la kronviruso devis ĉesi.

La bona informo estas, ke tiuj eventoj vikle renaskiĝas. Je la 2-a de aprilo 2023, en la urbo Lorena/SP, okazis unu plia tuttaga renkonto. De la 9-a ĝis la 16-a horo, tridek gesamideanoj kunsidis en “Clube Comercial” por vigla babilado.

(Daŭrigota sekvapaĝe)



Luiz Alberto Coelho prelegis pri “Esperanto, kiun estonton?”; Vitor Mendes prelegis pri traduko de kanzonoj kaj kantis; Maurício Monken (Esperantisto de pli ol 70 jaroj!) estis intervjuita pri siaj spertoj en la movado kaj ricevis omaĝon en formo de komplimenta plako; Paulo S. Viana prezentis “Guton da gramatiko” kaj “Ludon per proverboj”; Cristina Graaf prelegis pri savado kaj zorgado de bestoj okaze de naturkatastrofoj; Wilian Gomes prelegis pri “Kulturaj

Ekskursoj”, kiujn Esperanto-Asocio de San-Paŭlo nuntempe proponas; reprezentantoj de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵanejro kaj Esperanto-Asocio de San-Paŭlo raportis pri siaj lastatempaj agadoj.

Aparte oni diskutis pri la ebleco starigi Esperanto-budon en la Libro-Bienalo de Rio-de-Ĵanejro.

La tuta evento fluis en agrabla amika etoso, kun malgranda libro-servo kaj lunĉetoj.



ĈU VI KONAS BOBELARTON?

La agado de la retejo bobelarto.ink meritas atenton. Ĝi estas retejo por la Esperanta Literaturo. Ĝi organizas legosalonojn, verkokunsidojn (por komencantoj kaj por veteranoj), literaturajn maratonojn — ĉion per la plat-formo “zoom”. Ĝia interesa devizo estas: “Ĉu vi ne povas vivi sen literaturo?” Ĝi produktas ankaŭ dinamikan materialon en sia blogo. Ĝi ankaŭ kunlaboras kun la Akademio Litera-tura de Esperanto por “Interkultura Novelo-Konkurso”, aŭspicie de Univer-sala Esperanto-Asocio. La temo por la ĉi-jara konkurso estas: “La sekreta vivo de miaj najbaroj”. Limdato por sendo de tekstoj: la 30-a de septembro 2023.

Literaturo estas grava elemento por la Esperanta kulturo. Ni apogu Bobelarton!



Vizito al la urbo Herzberg

Nur 40km for de Gottingen kaj kun pli-malpli 12.000 enloĝantoj, ĉirkaŭata de montoj, trairata de la rivero Sieber kaj kun granda paper-industrio, Herzberg am Harz estas tre speciala urbo, ĉar en ĝi oni parolas la germanan lingvon kaj esperanton.

Ĉe la stacidomo ni jam estas bonvenigataj per tabulo en ambaŭ lingvoj.

Tra la urbo, ĉiuj direktotabuloj ankaŭ en du lingvoj.

Ene de tre bela domo estas la sidejo de Esperanto Kultur-Centro, kie apudstaras la verda flago kun stelo akceptanta nin kune kun la afiŝo pri la ĝemelurba partnereco inter la pola urbo Góra kaj la germana Herzberg, unuiĝintaj pere de Esperanto.

En tiu ĉi domo loĝas la paro Zsofia (ĵovia) el Bulgario kaj Petro el Germanio, kiuj sin dediĉas plentempe al la disvastigado de

Esperanto. Ĉi tie ili ankaŭ organizas kursojn, prelegojn kaj eventojn, ĉiuj en Esperanto, uzante la mirindan kaj bone organizitan librejon kiu enhavas librojn, revuojn, fotojn kaj albumojn el pluraj landoj.

Promenante tra la ĉefa avenuo de la urbo mi vidis grandegan publikan komuniktabulon dividitan jene: duono por la ĝenerala komu-



nikado, en la germana lingvo, kaj la alia duono por noticoj kaj aktivecoj pri kaj en Esperanto.

Tre proksime al la urbocentro, situas la statuo de Zamenhof, en grandega bloko el marmoro, sur kies kvar flankoj legeblas frazoj en la germana, pola, ĉina kaj esperanto: "Ludovik Zamenhof, la kreinto de Esperanto". La statuo estas arto de ĉina esperantisto nomata Ĉielismo.

Akompanate de la paro, mi iris al Parko Sieber, kie en la enirejo estas skribite "Bonvenon". Tie inter belaj arboj kaj ĝardenoj okazas pluraj aktivecoj por geinfanoj, gejunuloj kaj geplenkreskuloj. Fakte estas tre bele!

Ankaŭ tie enestas konstruaĵo en formo de seslatero, kie funkcias bone organizita muzeo, konsistanta el plenigitaj bestoj, devenantaj el ĉi tiu regiono de Germanio, kaj ankaŭ diversaj specimenoj de ŝtonoj kaj mineraloj. Jen mirinda klaso pri birdoj, mamuloj, fiŝoj, senvertebruloj, plantoj kaj arboj.

En granda konstruaĵo, kun salonego, troviĝas scenejo, tabloj, seĝoj, uzataj por kunvenoj kaj kongresoj.

Apud ĝi troviĝas bona biblioteko, kiu funkcias laŭ la sistemo "legu, prenu, donacu" aŭ eĉ "restu ĉi tie", en tiu ĉi larĝa, komforta kaj bone ornamita ĉambro por legado.

La Sieber Rivero disigas la Parkon laŭ sia tuta longo. Por transiri ĝin, de unu flanko al la alia, estas bela ponto kun frazoj en Esperanto.

Ni ĉirkaŭiris ĉi tiun belan parkon kaj vizitis preĝejon, ĉio en ardezo, kun grandioza arkitekturo kaj tre bela turo.

Dum nia eliro el ĉi tiu Parko, ŝildo diris al ni "Ĝis"!



Mi havis la okazon viziti la "Kastelon Herzsberg", en renesanca stilo, konstruita antaŭ 900 jaroj!! Ĝi nuntempe spertas multajn renovigadojn celantajn pli bonan konserva-don.

La kastelo estas malfermita al la publiko, pere de pagita vizito, kaj tiel ni povis vidi la ĉambrojn kun kiraso kaj tre malnovaj objektoj, dokumentoj, tekstoj, tapiŝoj portretantaj scenojn, pejzaĝojn kaj faktojn de la familio Guelph, kaj vidi belan orgenon, el la meza deknaŭa jarcento, de Engelhard, en perfekta funkciado, same kiel la ĉambron dediĉitan al Esperanto.

Mi ankaŭ vizitis la riveron Rume, en ĝiaj subteraj fontoj, kies akvoj estas nekredeble verdaj!! Estas impone vidi la akvon bobeli supren de la fundo por formi ĉi tiun riveron.




Dum la tagoj, kiam mi restis en ĉi tiu Kultura Centro, la brazila flago flirtis ĉe la enirpordo, apud la esperanta flago, dirante al ĉiuj preterpasantoj, ke tie en tiuj tagoj oni ŝirmas brazilan esperantiston.

Estis vere kleriga vojaĝo danke al la lingvo Esperanto!! Ĉi tiu estis mia 8-a vojaĝo al Germanio.

Koran dankon al la sindediĉa paro Jovia kaj Petro.

Francisca de Oliveira Calegari



**La fripongalerio
de Kinkas Borba**

Ĉeesta prelego la 27-an de maio (16h) en la sidejo de EASP
R. Faustolo, 124 - Água Branca

Gasto: Francisco Wechsler

Eltrovo

Maria Nazaré Laroca


Dum la infanaĝo
mi estis princino,
kaj loĝis en kristala palaco.

En ĉi aŭtuna majo,
sepdek kvin jaraĝa mi estos,
sed nur nun mi certas
pri tio, ke mi loĝas
ene de vitra korpo,
tre rompiĝema dometo.

Malgraŭ doloroj kaj sortoŝanĝoj,
ĝi estas mia hejmo:
tranĉita, polurita gemo
de l' "potenca senkorpa mistero."



Maria Nazaré Laroca



Adiaŭo de Lilia Ledon

La esperantistino Lilia Ledon da Silva forpasis aprilon 2023 en la ĉefurbo San-Paŭlo post serio da sankomplikaĵoj. Dum la lastaj 15 jaroj Lilian travivis diversajn malsanojn kaj malfavorajn situaciojn, kiel transplanton de reno kaj pankre-ato, koratakon, kanceron i.a., kaj en la lastaj monatoj iuj infektoj malfortigis eĉ pli ŝian korpon, kiu ne sukcesis rezisti. Ŝi lasas sian edzon Wilson Roberto da Silva, kun kiu ŝi vivis dum 47 jaroj, siajn gefratojn Marcel kaj Berenice Ledon, kaj nevojn. La paro ne havis filon.

Lilian estis filino de la paro Gilbert René kaj Symilde Schenk Ledon, forpasintaj antaŭ ĉirkau 20 jaroj.

Naskiĝinta la 12-an de decembro 1956 en la sudbrazila urbo Pelotas/RS, kun franca civitaneco, Lilian kaj la familio tuj transloĝiĝis al San-Paŭlo, kie ŝi vivis dum sia tuta vivo. Ŝi diplomiĝis pri Beletro (france, portugale, angle) ĉe la Universitato de San-Paŭlo (USP). En la Esperanto-movado, dum jaroj ŝi akompanis la gepatrojn okaze de kun-

sidoj kaj kongresoj, samkiel tajpante kaj revizianta librojn kaj artikolojn de la paro, precipe la verkojn de Gilbert. Kiel verkisto, ŝi publikigis la libron *Karuseloj* (1987) sub la plumnomo Sara Larbar. Em 2015, la aŭtorino pretigis duan reviziitan eldonon de sia verko.^(*)

Ŝi laboris kiel serĉesploristo kaj universitata profesoro, estante unu el la enlandaj pioniroj koncerne esplorojn pri beletro-kreado, kunlabore kun Cecília Almeida Salles kaj Philippe Willemart. Ŝi estis instruistino de la franca kaj tradukistino de libroj france-portugalen kaj inverse. Ŝi laboris ankaŭ kiel administranto en la entrepreno de sia patro, *Expor Manequenoj*, komence de sia kariero. Lastatempe ŝi emeritiĝis kaj dediĉis sin al hejmaj taskoj kaj sano-zorgado.

(*) <https://hdl.handle.net/11013/4962>



Lilian Ledon (1956 – 2023)

Vojoj kaj devojiĝoj de la homaro

Perdita en Lakta Vojo, Tero estas unu el la plej malgrandaj planedoj de la Suna Sistemo. Suno estas unu el milionoj da steloj en la ĉielo. Ni loĝas sur la Tero.

Ni vivas nuntempe en polarizita mondo: homoj kiuj pensas kaj agas dekstre kaj homoj kiuj pensas kaj agas maldekstre. Ili kritikas unu alian, kaj detruas la socian harmonion kaj la Etikon. Foje, ili luktas perforte kaj mortigas unu alian. Ŝajnas ke la socio malsaniĝis. Multaj teorioj estis kreitaj por kompreni tiun ĉi socian fenomenon. Ŝajnas ke ĉiuj serĉas nur la Povon, por la Juĝo, por la aŭtoritato, por privilegiigi siajn proprajn anojn.

Laŭlonge de la Homa Historio ĉiam okazis similaj okazoj. Ŝanĝiĝas la cirkonstancoj, la tempo, sed la popoloj restas dividitaj.

La rimedoj estas limigitaj, la naturo estas la sama, la Tero estas por ĉiuj, sed la homoj freneziĝis kaj deziras dividi la Teron!

Foje, aperis viro sur la Tero, en unu dividita popolo, submetita de la Romia Imperio. Li alportis mesaĝon pri Dia Regno, kaj la homoj kredis ke Li liberigos la popolon. Sed Li ne defendis la Romianojn, nek defendis la Hebreojn aŭ iun ajn alian popolon. Li proponis liberecon al Spirito, por ke tiu ĉi vivu pace kaj ame en iu ajn alia loko. La Hebreoj mortigis Lin. Neniu komprenis Lin ĝis nun! La hebreoj daŭrigas en konfliktoj; la Romia Imperio finiĝis. La homoj daŭras dividitaj.

Do, oni devus pensi ĉu ni devas daŭrigi la samajn opiniojn kiuj dividas nin aŭ ne. Adopti opiniojn de aliuloj ne estas la solvo. Diskuti senfine por esti prava ankaŭ ne estas la solvo. La solvo estas en la homoj mem.

Kristo jam proponis la solvon: “Amu vian proksimulon kiel vin mem.” Ĉu tiu ĉi regulo estas nur religia ordono? Mi pensas ke ne estas nur religia ordono,

(Daŭrigota sur la paĝo 26)

La Templanoj, iliaj misteroj, iliaj sekretoj


“La Templanoj, iliaj misteroj, iliaj sekretoj”

Aŭtoro: André Cherpillod

Eldonejo Fonto, 2022.

Mi amas nek sekretojn, nek misterojn. Al mi prefere plaĉas klaraj, facile videblaj aferoj, je la atingebleco de ĉiuj. Sed mi komprenas, ke la historio de la homaro neeviteble dronas ofte en obskurajn okazaĵojn, tiel ke restas faktoj, kiuj transformiĝas en dubajn kredojn kaj supozojn. Historiistoj tiam sin dediĉas al solvado de multflankaj enigmoj, pri kiuj ne eblas trovi certajojn.

La historio pri Templanoj, en la komenco de la dua jarmilo, estas unu el tiuj historiaĵoj. Mi konfesas, ke mi neniam tre interesiĝis pri ĝi. Ĝi aspektis al mia scencia kapo preskaŭ kiel superstiĉo. Tamen, kiam falis en miajn



manojn ĉi tiu bele eldonita libreto (malpli ol 100-paĝa), kies aŭtoro estas la respektinda Cherpillod, tiam mi decidis venki mian antaŭjuĝon. Mi ne pentis.

Malgraŭ ke la historio pri tiuj monaĥoj-soldatoj estas grandparte neklaraj, tiel ke multaj informoj pri ili estas nur supozoj, tamen la historia esplorado estas lerta, erudicia kaj kurioza. Kaj ankaŭ la simpla ekzisto de tia ordeno estas ja tre interesa socia fenomeno. La afero komenciĝis per areto da viroj, kiuj decidis formi armeon, por protekti pilgrimantojn al Jerusalemo. Ĉi tiuj piaj pilgrimantoj estis ofte viktimoj de teruraj atakoj. La protektantaj soldatoj formis ordenon,

kun striktaj reguloj de ĉasteco kaj malriĉeco. Ili feroce batalis kontraŭ la “saracenoj”. Iom post iom, tiu ordeno fariĝis potencega, riĉega kaj tre disvastiginta en Eŭropo. Onidire ĝi eĉ minacis la potencon de Romo. Tre atentokapta fenomeno estas, ke fariĝis vera paralela imperio en Eŭropo, kun vastaj proprietaĵoj kaj ŝipoj. Eble ili eĉ atingis Amerikon, multajn jarojn antaŭ ol Kolumbo. Kaj ili enkondukis ekonomian sistemon, kiun oni emas konsideri la unua provo de kapitalismo.

Kompreneble, la roma eklezio poste eksentis la minacon de tiaj potencegaj templanoj. Sekvis kruela per-

sekutado kaj konfiskado, kun akuzoj pri herezo, torturoj, mortigoj. Malluma epizodo en la vivo de Eŭropo. Restis onidiroj pri kaŝitaj trezoroj, kaj suspektoj, ke ankoraŭ en la 20-a jarcento postrestis spuroj de templanoj kaj ties sekretoj.

Kio plej mirigas en ĉi tiu bela libro estas, unue, la detala kaj bone pri-komentita esplorado de historiaj dokumentoj kaj faktoj, kiuj koncernas la templanojn; due, la ĉiam vigla, eleganta kaj plezurdona stilo de André Cherpillod. Eĉ por legantoj, al kiuj ne plaĉas sekretoj...

(Paulo S. Viana)

Daŭrigo de la paĝo 24 (El mia vidpunkto) *Vojoj kaj devojiĝoj de la homaro*

sed Etika Ordono, nepra Socia ordono, ĉar en la kerno de tiu ĉi ordono ni trovas la Respekton inter la homoj; ni trovas la Fidon inter la homoj; ni trovas la Dignon de ĉiuj homoj.

Kristo ne fondis Religion, sed post-lasis al ni ĉiuj la plej gravan filozofion, neniam bone komprenitan de la homaro.

Fakte, la renoviĝo de la homaro nur okazos ekde la individua ŝanĝiĝo.

La sumo de la ĉiuj ŝanĝiĝoj estos la renoviĝo de la homaro. Sed, tio dependos de ĉiu homo, de lia volo ami sian proksimumon kiel sin mem! Simple, tiel!

Neniu alia filozofio, doktrino, religio, teorioj, sukcesis solvi la problemojn de homaro. Do, ni bezonas senfieri unu plian fojon relerni Kriston kaj vivi Liajn lecionojn por nia tera agado.

João Otávio Veiga Rodrigues

Homo sapiens sapiens

Iam simio renkontis kranion kaj tuj scivoleme demandis kiu ĝi estas. Tiam, fiere respondis la kranio ke li sin nomas Homo sapiens sapiens. Ankoraŭ ne kontenta pri la respondo, la simio petas de li informojn. Nu, kion signifas sapiens sapiens? Rapide diras la kranio: sapiens sapiens signifas dufoje saĝan homon.



La simio tuŝas sian mentonon kvaŭ serĉas ion en sia memoro.

— Bone, mi konis homon sapiens, sed nur unufoje sapiens.

Per rikana rido ekklarigas la kranio:

— Jes, tio estis mia antaŭlo el kavernoj, mi estas moderna homo, multoble inteligenta.

— Ĉu vere multoble inteligenta vi estas?... Kiam mi konis vian antaŭulon li ĉasis kaj bredis bestojn por sin nutri.

— Jes... tiam estis, tamen nun ni komercas per ili, fieras la kranio.

— Ĉu vere? Via antaŭulo ĉasis nur por manĝi aŭ manĝigi sian familion, nai-ve konstatas la simio.

— Certe, sed per tio ne eblas vendi ilin kaj gajni monon, mokas kranio pro la bubeca miro de la simio.

— Ĉu tial vi estas multe pli inteligenta ol la aliaj bestoj? — konkludas la simio.

— Jes, ni bezonas monon, ĉu vi komprenas?

Ankoraŭfoje la simio ne sentas saĝon pri la ideo kaj demandas:

— Kial mono estas tiom necesa?

La kranio penas klarigi al li ke mono estas papero kaj per ĝi ni povas ekhavi posedaĵojn. Sed por simio ne necesas havi posedaĵojn. Ĉio, kio estas en la naturo jam sufiĉas.

— Nu! Neniu malsatas per tiu mono? — rezonas simio.

— Ne tiom ĝuste, homoj bezonas

perlabori monon. Kiam ni estas maturaj ni laboras aŭ laborigas aliajn homojn, tiam ni posedas monon por nin nutri.

Siaflanke la simio kredas ke sufiĉas la naturo por sin nutri kaj ekdubas pri la saĝeco de Homo sapiens sapiens. Tiam ekdiras la simio al la kranio:

— Finfine, saĝo estas trajto, per kiu oni scias distingigi inter bono kaj malbono, inter pravo kaj malpravo. Sed pri inteligenteco: Bona inteligenteco estas la kapablo, per kiu menso scipovas produkti matematikan scienccon, ekzemple.

Tio eble estas komplika por la kapo de korsimpla simio, kompreni kiel homo povas havi tiel multe da saĝo. Ekregas longa paŭzo, dum la simio rigardas la kranion sur dezerta kaj malvarma kampo, kie nur kelkaj vivantaj estaĵoj estas observataj.

Kiam la simio ankoraŭ sidis kun la kranio sur sia mano, tiam, li turnas sin al la kranio kaj demandas de li:

— Kiel eblas resumi la tutan saĝon nur pro tio ke la homaro kreis monon, tiel kiel vi citis? Vi, kompatinda kranio, ankoraŭ estas besto!

— Ne! Mi tute ne similas al besto. Mi estas plene racia kaj inteligenta. Aldone mi posedas saĝon.

— Ĉu? Tamen.... Via korpo ankoraŭ tia estas. Besto vi estas. Ja, malriĉa perdita, jam jardeke forgesita, skeleto sur planko de ĉi tiu senviva tero.

— Tamen, multaj aferoj malsimilas inter mi, homo, kaj aliaj bestoj. Mi prezentas sentojn, virtojn kaj kvalitojn. — fanfarone rakontas la kranio.

— Ankaŭ bestoj havas kvalitojn, virtojn kaj mavirtojn tiajn. — abrupte asertas la simio.

— Krome, — reliefigas la simio — tiel mi komprenas: vi homoj iel ajn flamiĝas, alivorte homoj freneze kolektas; praktikadas perforton; mortigas unu la alian sen ia skrupulo. Dirus vi: perforto inter bestoj entenas mortigi predon, tio estas neracia perforto. Tamen, ne temas pri tia perforto. Tio fundamente konsistas en batalo por postvivado, ja estas batalo por manĝaĵo.

Mi prenas el viaj ideoj ke la homaro kolektas monon por aĉeti aferojn aliflanke ni prunteprenas el la naturo tion, kion ni bezonas sen troa egoismo. Eble tia trajto temas nur pri homoj.

Ha! Argumentus vi: iuj bestoj konservas multe da manĝaĵo. Nepre jes. Kiam vintras, tiam mankas manĝaĵo. Vojirante per la sama rezonfadeno ni ambaŭ sentas doloron, malgraŭ ke, plej interese, kiam bestoj kaŭzas dolo-

ron al alia vivanta estaĵo, tiam estas pro ia postviva kialo. Viaflanke homoj konscie volas kaŭzi doloron al alia homo. Ĉu ekzistas saĝo en tio? Ĉu bestoj malsimilas disde homoj?

— Eventuale vi pravas. — iom honte konsentis la kranio — Kvankam ĉio, kion ni faras celas nian vivkvaliton, ni laboras longan vivon; kreskigas idojn; pergajnas monon ĝis atingo de vivo-kvalito. Aldone vojaĝi kaj ĝui tion, kion la planedo proponas al ni.

— Vi juĝas tion kiel el pura rafinita inteligenteco! Mi konjektas ke vi laboras tutan vivon por havigi al vi monon kaj per tio vi perdas vian sanon. Tiel, proksime al la sojlo de via vivo vi uzas tian saman monon por reakiri vian sanon — klarigis la simio.

— Ej! Kara simio. Kion vi celas? Mi ne povoscias ĉiujn respondojn. Mi nur elstarigas la malsimilecon inter ni.

— Kiam argumentoj venas al fino, tiam estas preferinde ĉesigi la diskuton. — ekrezonis la simio.

— Senkulpigu min, — konsternite petas la simio — se iel vin ĝenas miaj demandoj. Cetere estas strange al mi havi monon por aĉeti manĝaĵon. Efektive manĝaĵo estas ĉie disponebla. Ni, bestoj, facile prenas kaj dividas ĝin. Neniu malsatas! Certe, tio ankaŭ oka-

zas al vi. Ĉu eĉ ne unu el via socio malsatas?

Iom post pripensado respondis la kranio:

— Foje-foje homoj malsatas.

— Kien ĉio kondukis vin ĉiuj, homoj? — ekadmonas la simio kaj la kranio atente aŭskultas.

— Nun, ĉiuj homoj estas ĉi tie sur la tero tiel, kiel vi, senviva kranio. Kion vi postlasis? Plaĉus al mi aldoni kien vi iras post kiam tiu bombo, farita de vi mem detruis ĉion. Plie la homaro estas senviva sur ĉi tiu senfekunda grundo.

Post nelonge la kranio restis silenta, kvankam iel serĉis vortojn por rebati la simion. Tiam ĝustatempe antaŭ ol la kranio povus ion diri, la simio konkludis per kelkaj pliaj vortoj.

— Mi scias ke vi mortigis unu la alian, disĵetis bombojn unu sur la alian pro la pasio eltrovi pacon per milito. Ĉu ne estus saĝe solvi per dialogo la problemojn? Nu, entute, ĉu vi estas saĝa besto?

Tiumomente silentis la kranio, dum la simio atente trarigardis atendante la respondon, kiun homo sapiens sapiens ne scipovis respondi.

Alexandre Prado

Haltu, ni ŝanĝu la sidlokon

Tion mi ne inventis. La vivo estas tre bela, sed ĉio povas okazi. Ni estu atentaj!

Se mia memoro ne trompas min, ĉio komenciĝis en la pasinta jarcento, proksime al la jaro 1952. En tiu bieno loĝis multaj italaj devenintoj, sed du familioj aparte prenis mian atenton. Ili loĝis proksime unu la alian kaj ne malofte oni vidis Eŭzebjon kaj Eŭlaljon ludantaj kune, jen en la kafarbaro, jen en la rivereto. Ne necesas diri ke ili estis blondaj kun bluaj okuloj kaj paroladis pli multe per la manoj ol per la buŝoj. Ĉiam nudpiede postkurante papilion, eĉ en malvarmaj tagoj, paŝante sur malseketa herbo, la du perdadis la nocion pri tempo.

La du familioj koincide transloĝiĝis en la sama jaro en la malgrandan urbon nomatan Ĵaleson. Tiam Eŭzebjo kaj Eŭlaljo, en frua adolteco, enamiĝis unu la alian kaj komencis novan familian ĉelon. En tiu aŭtuno Eŭlaljo gravediĝis kaj nova defio alproksimiĝis. Ili ekstudis en mezgrada lernejo kaj la

vojo ĝis la lernejo estis longa. Tiu-tempe nur riĉuloj havis aŭton kaj, sen alia rimedo, Eŭzebjo devis aĉeti malnovan biciklon por konduki la tiaman gravedan edzinon al la lernejo. Dum la tagoj la paro laboris en simplaj postenoj kaj vespere Eŭzebjo, per fortaj kruroj, penis veturigi Eŭlaljon, kun granda ventro, sur la malforta biciklo. Kelkfoje la biciklo ne iris rekte, male, deflankiĝis.

En suna aprila mateno naskiĝis bela rozkolora bebo. La tempo pasis, la bebo kreskis bela kaj bonhumora. Profesie la patro lernis de sia plej aĝa frato nociojn pri elektro. Kelkan tempon poste la paro sukcesis ekhavi pli bonajn vivkondiĉojn kaj naskiĝis aliaj du infanoj kaj la familio Romano denove transloĝiĝis. Ĉi-foje, pro ŝia laboro, ili venis al la urbo San-karlo, kie ankaŭ mi loĝis, kaj tie restis multajn jarojn. La lastaj dek jaroj estis la plej bona tempo de ilia vivo. Eŭzebjo ne plu laboris kaj profitis la tempon por piedirado, sportumado kaj vag-

ado tra la kvartalaj stratoj, ktp. Tamen ia surprizo batis ilian pordon. Iam, li subite perdiĝis kaj ne sciis reveni hejmen. Oni konsideris tion normala afero. Post kelkaj tagoj la afero ripet- iĝis. Post unu monato, la okazintaĵoj fariĝis oftaj. Eŭlaljo ektemis, venis al ŝia menso la fantomo de la germana malsano; ŝajnis al ŝi, ke la tero ne plu estis sub ŝiaj piedoj. La afero fariĝis nekontrolebla. La diagnozo skuis la

tutan familion, Eŭzebjo estis vere mal- sana. Alzheimmer senkompatate prenis lin, je la 68-a aĝojaro. Eŭlaljo prenis sur sin la gvidadon de la familio.

Haltu, ni ŝanĝu la sidlokon. Sidiĝu sur la malantaŭan benkon. La fikcia biciklo sekvas sian vojon. Ĝis kiam, oni ne scias. Hieraŭ li kondukis, hodiaŭ li estas kondukata.

Gilberto Menegasso



Daŭrigo de la paĝo 8 (Kino kaj aliaj artoj) *Yayoi Kusama*

bildojn kiuj min turmentas en skulp- taĵojn kaj pentraĵojn.”

Ŝia laboro estas mikso de diversaj artoj kiel gluaĵoj, pentraĵoj, skulptaĵoj, performecaj artoj kaj mediaj instalaĵoj. Kaj unu el karakteroj de ŝiaj verkoj estas la multnombraj cirkloj kaj punktoj.

Oni ne forgesu ke unu el ŝiaj artaj instalaĵoj troviĝas en Brazilo! Ĝi estas en la Muzeo de Inhotim, Minas Gerais - sub la nomo de “Narcissus Garden

Inhotim”. Ja indas certe viziti tiun kuriozan muzeon.

Nuntempe ŝi vivas en malsanulejo por mensaj malsanuloj kaj laboras en sia ateliero kiu estas apude.

Ĉu vi ĝuis koni iom pli pri Yayoi Kusama? Mi taksas ŝian vivon ege inspiriga. Ofte oni haltas antaŭ la plej eta malfacilaĵo, sed Kusama nur sekvis antaŭen. Imagu se ŝi rezignus je alfronto de la plej eta baro? La mondo certe ne estus samkolora!

Anna Lobo de Carvalho

Lingvaj Respondoj de Francisco Wechsler

Demando

Multaj Esperantistoj ne sukcesas bone kompreni la signifon de la vorto *estiel*, en nia lingvo. Ĉu vi povus klarigi tion?



Francisco S. Wechsler

Respondo

Por kompreni la signifon de *estiel* aŭ *estkiel*, necesas unue kompreni, ke la Fundamenta tabelvorto *kiel* havas, interalie, du apartajn sencojn: la komparan kaj la identigan. Jen kelkaj ekzemploj pri kompara senco ĉerpitaj el la Fundamenta Ekzercaro:

*Mi estas tiel forta, **kiel** vi.* (§10)

*Mi zorgas pri ŝi tiel, **kiel** mi zorgas pri mi mem; sed ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas.* (§18)

*Ĝia uzado estas tia sama **kiel** en la aliaj lingvoj.* (§27)

*Tiu ĉi malfreŝa pano estas malmola, **kiel** ŝtono.* (§33)

*Nia regimentestro estas por siaj soldatoj **kiel** bona patro.* (§37)

Kaj jen kelkaj Zamenhof-aj ekzemploj pri la identiga senco de la vorto *kiel*:

*Via verko povas servi **kiel** bona modelo de efektive gravaj kaj utilaj*

Akademiaj laboroj. (Letero al R. de Saussure, 1910)

[...] ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la plimulto da bonaj verkistoj, devas esti rigardata **kiel** bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; [...] (Lingva Respondo 3, La Revuo, 1906)

Tiu ĉi punkto [...] en la praktiko montris sin **kiel** tre grava barilo por la disvastiĝado de nia lingvo. (Pri Reformoj en Esperanto, 1894)

La organizanta komitato faris al mi la honoron, elekti min **kiel** prezidanton de l' kongreso [...] (Parolado ĉe la Unua Ĝenerala Kunveno, 1905)

Sed iafoje estas malklare, ĉu temas pri komparo aŭ identigo, kaj la vera signifo de la frazo dependas de interpreto. Ekzemple:

Kiel la estro de la diversaj grupoj, mi klopodis interpacigi ilin ĉiujn. Unua interpreto (identiga senco): mi estas aŭ estis la estro, kaj en tia rolo mi klopodis al interpacigo. Dua interpreto (kompara senco): same kiel la estro aŭ laŭ lia maniero, ankaŭ mi klopodis al interpacigo.

Kelkaj modernaj aŭtoroj provas distingi la identigan funkcion de *kiel* disde la kompara, uzante la vorton *estiel*: Estiel la estro de la diversaj grupoj... Oni ankaŭ proponis *estkiel* por la sama funkcio. Tamen ambaŭ vortoj estas tute superflujaj, kaj ekzistas en nia lingvo pluraj rimedoj por klarigi distingi unu signifon de la dua.

Do, en la ĵus citita frazo, se celi identigon, oni uzu, ekzemple:

Estante la estro de la diversaj grupoj... aŭ: **En la rolo de** la estro de la diversaj grupoj... aŭ: **Plenumante la postenon** de estro de la diversaj grupoj... Ktp.

Se celi komparon, oni diru, ekzemple:

Samkiel la estro de la diversaj grupoj... (en la sama maniero, kiel la estro) aŭ: **Same kiel** la estro de la diversaj grupoj... (krom la estro, ankaŭ mi klopodis al interpacigo)

Resume: la vortoj *estiel* kaj *estkiel* estas tute nenecesaj. Kvankam PIV ja registras la unuan, ambaŭ estas evitindaj.



Quer aprender Esperanto?

**PROGRAMO
MIA AMIKO**



pma.esperanto.org.br